INSTRUISTA TREJNADO

en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI denove kune organizas unujaran **instruistan trejnadon**, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua okazos 12-18.09.2009, la dua 30.01-05.02.2010) kaj intertempan hejman laboradon, retan konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2010. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

Kondiĉoj: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

Partoprenkotizo: A-landoj: 360 EUR, B-landoj 130 EUR por unu semestro.

Informo kaj aliĝo: interlin@amu.edu.pl

El la Programo

Lingvopedagogio (Katalin Kováts, Maria Majerczak, Zsófia Kóródy, Ilona Koutny):

Bazaj faktoroj de lingvopedagogio (instrumetodoj, instrupocezo, evoluigo de kapabloj, taksado, lingva interfero, ktp.)

Esperanta metodiko (instruado de elparolo, gramatiko, vortoprovizo kaj kulturo, planado de lecionoj kaj kursoj)

Instruhelpiloj (de instruista kofro tra eldonaĵoj, filmoj ĝis retkursoj)

Esperanta kulturo (Tomasz Chmielik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Ilona Koutny):

Plej gravaj eventoj de la historio de esperanto

Ĉefaj periodoj kaj verkistoj de e-literaturo

Tiklaj punktoj de e-gramatiko

Lingva trejnado (per testoj)

Donaco: partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj:

La postdiplomaj **Interlingvistikaj Studoj** de UAM lanĉis novan 3-jaran studadon kun planataj specialiĝoj pri metodiko, komunukado kaj tradukado. Elstaraj specialistoj pri esperantologio kaj interlingvistiko gvidas la kursojn.

Vizitu la sesion enkadre de la Instruista trejnado! Tranoktado eblas en studenthejmo, mendu samadrese.

Informoj kaj aliĝo: interlin@amu.edu.pl aŭ ikoutny@amu.edu.pl
http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html

► **Interlingvistika simpozio**

Festa Interlingvistika simpozio estis organizata okaze de la 10-jariĝo de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) inter la 18-19a de septembro 2008. Al la riĉa programo kontribuis i.e. Vera Barandovska, Detlev Blanke, Tomasz Chmielik, Michel Duc Goninaz, Sabine Fiedler, Aleksander Korĵenkov, Katalin Kováts, Aleksander Melnikov, Blazio Vaha, John Wells, la eksaj kaj nunaj gestudentoj. Inaŭguris ĝin vicrektoro de la universitato kaj vicdirektoro de la Lingvistika Instituto. Dum la unua verspero okazis bonetosa bankedo.

► La tradicia semajnfina kultura aranĝo **ARKONES** (18-20.09. 2009), same en Poznano, proponas agrablan amuziĝon kun teatraĵoj, filmoj, muziko, diskutoj, ktp (http://arkones.org/eo) tuj post la septembra sesio, ĉi jare la 25-an fojon.

► La laŭtemaj **etvortaroj** plene trafas vian celon, se vi volas lerni lingvon (ĉefe en progresa nivelo) kaj ekzameniĝi, aŭ se vi volas paroli kaj skribi pri iu temo kun riĉa vortprovizo. La ĉ. 1200 vortoj kaj esprimoj en la unuopaj temoj estas ordigitaj sub ofte uzataj kapvortoj laŭ la praktikaj bezonoj de lingvouzo (verboj, adjektivoj kaj parencaj esprimoj estas ĉemane por priskribi la situacion). Fine de la etvortaroj kelkaj leksikaj kaj komunikaj ekzercoj por esperanto helpas la prilaboron de la temoj memstare aŭ en grupo.

La etvortaroj helpas ankaŭ dum la lernado de la aliaj du lingvoj (angla - hungara aŭ germana - pola). En la vortostoko kaj aranĝo speguliĝas la lingva bildo de ĉiuj tri lingvoj. Antaŭaj volumoj de la serio:

● Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri **Lernado kaj Laboro**. 2002 ● Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri **Lingvo kaj Komunikado**. 2003 ● Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri **Homa vivo kaj Loĝado** 2005 ● Angla-Esperanta-Litova etvortaro pri Lernado kaj Laboro. 2005.

Ili ***mendeblas*** (krom AEH2) ĉe UEA aŭ la aŭtoro, rabato por 3 ekzempleroj.

► Aperis **Germana-Esperanta-Pola etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado** (Koutny k.a. 2008)!